# *Internacia Kongreso Pedagogio 2021: por unueco de la edukistoj*



**Drino. C. Ena Elsa Velázquez, kuba ministrino pri Edukado**

Havano, feb 1 (RHK) Komenci?as la Internacia Kongreso Pedagogio 2021 en ties 17-a eldono, por la unua fojo per formato virtuala kiu sesios ?is la 3-a de februaro. ?in partoprenos ?irka? 600 edukistoj de Kubo kaj la mondo.

La kongresoj Pedagogio komenci?is en la 90-aj jaroj por kunvoki docentojn, akademianojn kaj gvidantojn de la eduka sektoro de Latinameriko, Karibio, E?ropo, Afriko kaj Azio.

Sub la slogano “Por la unueco de la edukistoj kaj en pandemia tempo”, la kongreso debatos pri la nova kunteksto kie okazas la instruado.

La drino. C. Eva Escalona, prezidantino de la organiza komiato, scigis ke tiu ?i kongreso celas la plenumon de la Celaro de Da?ripova Evoluo, sed aparte pritraktos la sintenon de la klerigistoj fronte al la pandemio.

La ministrino pri edukado, Ena Elsa Velázquez malfermos la sesion per ina?gura ?efprelego, kaj poste sesios la virtualaj kursoj.

Elstaraj personecoj, edukistoj kaj akademianoj landaj kaj eksterlandaj prelegos dum la tritaga virtuala kongreso, kaj anka? oni prezentos la atingojn de la kuba scienco fronte al la pandemio, krom forumo por debati kaj diskonigi la spertojn pri instruado kaj lernado en tempoj de Covid-19.

La nuna eldono virtuala Pedagogio 2021 estos elsendita per la enlinia platformo YouTube por ke la interesitoj sekvu ?iajn sesiojn.

En tempoj de Covid-19, Pedagogio 2021 alvokas forte klopodi en la batalo komuna kaj vokas docentojn kaj gvidantojn disdividi spertojn por doni kontinuecon al la instruado en apartaj cirkonstancoj trudataj de tiu ?i pandemio.

Fonto: pedagogiacuba.com

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/246340-internacia-kongreso-pedagogio-2021-por-unueco-de-la-edukistoj

Radio Habana Cuba